***************************************************************************

AGEI-CIRKULERO junio/2 2006 (n-ro 11)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

***************************************************************************

AGEI-anoj, membriĝontoj, interesiĝantoj pri E-instruado: bv. legi kun aparta atento!

I: AGEI
a) estraro
b) membroj
c) membriĝo
d) taskoj
e) informado
f) alvoko

II. DVD pri Esperanto
III. MODELLECIONOJ
IV. POŜAMIKO
V. TORPEDo-2
VI. EKZAMENOJ

I. AGEI-kunveno en Braunschweig

La Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) kunsidis dum la 83a Germana Esperanto-Kongreso en Braunschweig. La ĉeestantaj membroj en la nomo de la fakasocio de GEA dankis la multjaran laboron de sia malnova estraro, i.a. al Michael Scherm kaj Eugen Schneider, kaj esprimis sian deziron esti landa sekcio de UEA/ILEI.

a) ESTRARO: Post la elektoj jen la nova estraro de AGEI:
prezidanto: Zsofia Korody (37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6. Tel: 05521-5983, zsofia.korody@esperanto.de)
vicprezidanto: d-ro Rudolf Fischer
kasisto, membroadministranto: Christof Krick (59872 Meschede, Alte Landstr. 26. Tel: 0291-51535, christof.krick@freenet.de)
estrarano: Harald Schmitz
kasrevizoroj: Wolfgang Bohr, Karin Klose

b) MEMBROJ
AGEI estas jure enskribita asocio, la personajn ŝanĝojn oni anoncis ĉe la notario.
AGEI havas 99 membrojn (stato 18a junio). La membrokotizo por 2006 estas 25 EUR, por paroj (kun la sama adreso 30 EUR). Ni petas ĉiujn, kiuj pagis ĉi-jare rekte al ILEI fariĝi de 2007 regula membro de AGEI kaj pagi la asocian kotizon al la AGEI-kasisto Christo Krick.

c) MEMBRIĜO por novaj aliĝantoj al AGEI: BONVENON!
Ni esperas, ke nia membraro kreskos kaj pli kaj pli multaj gekolegoj, geamikoj aliĝos al AGEI! Ju pli ni estas, des pli forte ni povas reprezenti E-instruadon, helpi unu la alian por la komuna celo: disvastigi E-on per instruado. Se vi membriĝas nun, jam ricevos servojn: la fakgazeton de ILEI (IPR: Internacia Pedagogia Revuo) dum la tuta jaro 2006, rabaton por partopreno en instru-rilataj fakaj kunvenoj (ekz. TORPEDo-2: Pedagogiaj metodikaj tagoj komence de oktobro), ktp. (Laŭbezone ni povas sendi al vi kopion de la asocia statuto.)
Vi povas plenigi la aliĝilon-enketilon rete: http://instrureg.laarts.info aŭ aliĝi poŝte ĉe la Kasisto Christof Krick. Kontonumero: 406622 507 Postbank Köln BLZ 37010050

d) TASKOJ: La ĉefaj taskoj estas la sekvaj:
- plivastigi E-instruadon en Germanio, oferti pli da kursoj en urbaj kluboj, lernejoj, popolaltlernejoj, ktp.
- atingi pli bonan, pli rektan informfluon, kunlaboron inter E-instruantoj, instruistoj
- reprezenti la E-instruantojn, instruistojn de Germanio en internaciaj renkontiĝoj, ĉe ne- esperantistaj fakaj forumoj, ktp.
- zorgi pri faka kaj metodika klerigado, pluklerigado de E-instruantoj

e) INFORMADO
La faka gazeto de AGEI: Esperanto kaj Instruado de kelkaj jaroj ne aperis kaj la asocio decidis ne plu aperigi ĝin. Anstataŭantaj informkanaloj estos:
- Internacia Pedagogia Revuo (IPR) (ricevas ĝin poŝte aŭ rete ĉiu membro de AGEI)
- Esperanto aktuell (ricevas ĝin ĉiu individua membro de GEA)
- e-ins@yahoogroups.com (informas pri tutmonda E-instruado)
- www.edukado.net (retpaĝaro kun vastaj servoj por kaj informoj pri E-instruado, ekzamenoj, ktp.)
- Instru-Cirkulero ekde nun AGEI-cirkulero (porokaza, neregula informilo por rapida informado, aktualaĵoj, alvokoj, ktp.) Ricevas ĝin AGEI-membroj kaj interesitoj pri E-instruado. Ne-retumantoj ricevos printitan, poŝtan version.
Bv. sendi viajn informojn (alvokojn, novaĵojn, raportojn, fakartikolojn k.s) rekte al la redaktantoj aŭ al Zsofia Korody. Dankon.

f) ALVOKO: Por pli bona kunlaboro, informfluo, ni petas ĉiujn iamajn membrojn, novajn interesiĝantojn anonci sin, kaj alvokas ĉiujn, kiuj ŝatus, volas kaj povas helpi plivastigi E-instruadon en Germanio: bv. membriĝi en la reaktiviĝanta faka asocio.

II. DVD PRI ESPERANTO estas pretigata kaj estas tradukota al kiel eble plej multe da lingvoj. La germana traduko estas preskaŭ kompleta, sed bezonas kontrolon, konsilojn. La traduksistemo estas libera (laŭ la principoj de Vikipedio), vidu ĉe: :
http://nova.ikso.net/filmo_eo_estas/parto1.php?lingvo=xx (xx = lingvokodo de via lingvo). Viaj rimarkoj, plibonigoj estas bonvenaj. Dankas Bea la.ville.heleuc@wanadoo.fr

III. MODELLECIONOJ
Por nova projekto edukado.net serĉas surbendigitajn kursojn, kurserojn, en kiuj spertaj instruistoj gvidas lecionon laŭ speciala aŭ sukcesa metodo, prezentas interesan ekzercon. Ankaŭ por farotaj surbendigoj povas okazi interkonsento inter la projekto-teamo kaj eksteruloj. Se vi havas materialon, kiu povas taŭgi, bv. kontakti la projektgvidanton: Katalin Kovats katalin@ikso.net

IV. POŜAMIKO
La vinktita libreto verkita de B. Allee kaj K. Kovats estas 40 paĝojn (mal)granda kaj praktika. La poŝforma eldonaĵo (A6) ne estas strukturigita lernolibro laŭ la klasika senco, ĝin konsistigas gramatikaj resumoj, memorigiloj, tekstetoj, kelkaj ekzercoj kaj laŭtemaj bildvortaroj riĉe kolorilustritaj. Ĝi bone povas servi kiel poŝlibreto helpa al infanaj aŭ plenkreskaj kursanoj je komencanta kaj komencinta niveloj, aŭ kiel varbcela donaco kaj propagandilo.
Prezo: 5 EUR, mendebla ĉe Germana Esperanto-Centro 37412 Herzberg, Grubenhagenstr. 6, esperanto-zentrum@web.de) aŭ en granda kvanto rekte ĉe redaktanto@edukado.net.

V. TORPEDo-2
30a junio estas la limdato de la unua, plej favora aliĝperiodo al la Tutlanda Oktobra Renkontiĝo Pedagogia (29 sept.- 03.10.2006). Rabato por frualiĝantoj, gejunuloj kaj AGEI/ILEI-membroj!
Ĉeftemo: lernolibroj, instruhelpiloj kaj adekvataj metodoj. Paralela klerigkurso por ekzamenaj komisaroj.
Ĉefprelegantoj, metodikaj kunlaborantoj i.a. Stefan MacGill, Josef Schiffer, Gerald Tucker.
Informilon, aliĝilon vi trovas en .pdf formato ĉe http://ic-herzberg.de/ aŭ petu de mi poŝte.

VI. EKZAMENOJ de GEA/GEI kaj UEA/ILEI dum la renkontiĝo eblos! Bona ŝanco por akiri atestilon pri via lingvoscio. Bv. anonciĝi menciante la deziratan nivelon!

Atendante viajn ideojn, helpon, kunlaboron
kun multaj salutoj:

Zsofia Korody
prezidanto de AGEI
zsofia.korody@esperanto.de